# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER: RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speelluinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO / JAARGANG 4 N° 1 JAN. 1984

ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU

Estraranoj, komisionestr, -anoj, kunlaborantoj de FEL (vd p. 2) estas petataj laŭ tiu ĉi vojo bonvole prepari raportadon pri sia agado dum 1983 por nia ĝenerala jarkunsido okazonta je sabato 24-a de marto 1984. Je tiu sama dato ankaŭ okazos administrantara kunsido (antaŭtagmeze) al kiu ĉiuj niaj administrantoj kaj grup-reprezentantoj estas invitataj. Kompreneble al la ĝenerala jarkunsido kiu okazos je tiu sama dato, sed posttagmeze, ni invitas ĉiujn niajn membrojn.

---

Interesitoj en la programoj de LA VERDA STELO de Antverpeno, atentu !

En la januara/februara numero de ESPERANTO PANORAMA vi povas legi ke je respektive 10-a kaj 11-a de februaro 1984 okazos prelego (U.J. Moritz) kaj kolokvo pri "LIBERECO DE LINGVO KAJ KULTURO" (Vrijheid van Taal en Cultuur). Nu, tiuj prelego kaj kolokvo ne okazos kiel indikite, sed je respektive 3-a kaj 4-a de februaro. Bonvole noti tion. Dankon.

---

Nia onta estrarkunsido okazos je sabato 4-a de februaro en ESPERANTODOMO

---

K L U B O 1 0 0.

Jam pagis pluraj personoj. Vidu en la sekvontaj paĝoj.

Kontnumero : 034-0379435-33

==========================================================

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



# PROTOKOLO

## PRI LA ESTRARKUNSIDO DE SABATO 14-A DE JANUARO 1984 EN ANTVERPENO

Ĉeestas : Erik D'Hont (ED), Trees Dooms (TD), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES), Kristin Tytgat (KT), Hilde Van Ingelgem (HVI) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Senkulpigon petis : Roland Rotsaert, André Staes k. Jules Verstraeten.

Prezidas : ES
Protokolas : JB.

Komenco : 14.15 h.

---

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 03 12 1983 estas aprobita.

2. Plenumitaj taskoj :

2.1. JB petis al UEA kaj Heroldo de Esperanto publikigon de nia alvoko pri kunlaboro al la planita kolokvo okaze de nia venonta kongreso en Aalst. UEA jam publikigis ĝin, kvankam ne tute kiel demandite. HdE ankoraŭ ne, sed la lasta aperinta numero de HdE datiĝas nur de novembro 1983. Ni do atendu la sekvonta(j)n.

La referendumo (dua) rilate al la (re)elektado de novaj estraro kaj prezidanto apenaŭ havis rezulton. Ĝis nun respondis nur 3 grupoj : Aalst kaj Kortrijk kaj Blankenberge.

2.2. PP esploris la eblecojn pri ŝparo en la elektro-uzado, sed trovis ke tio praktike ne eblos. La nura ebleco estas limigi kiel eble plej la uzadon de elektraj aparatoj kaj lumigiloj.

2.3. ES daŭrigas siajn klopodadojn rilate al la okazonta en Bruselo Monda Kongreso pri Aplikata Lingvistiko. Ĝis nun promesis kunlabori Marc Demonty kaj Pierre Janton. Li atendas respondon de S-ro Simonet.
ES bedaŭras la ŝajnan(?) malinteresiĝonen la propaganda kaj informa programo, konstatinte ke la eminentuloj de UEA (estraranoj) eĉ ne respondas al leteroj k.s. Li ne akceptas la ĝenerale uzatan senkulpigon: "mi ne havas tempon". Li trovas tion ne tre serioza.

ES disponas pri tre interesaj tekstoj por tradukado.

ES raportas ke Prof-ro Franck prelegis en la universitato de Mons kaj ke ekis kunlaborado inter Mons kaj Paderborn.

2.4. KT, sekve al peto de la ĉefdelegito (A. Orsolini) pri indiko de JD = Juna Delegito de UEA (vidu 8.4. de la antaŭa protokolo), je 16 12 1983 dissendis invitleteron al la membroj de TEJO por ke ili kontaktiĝu kun

A. Orsolini se ili pretas iĝi juna delegito. Ŝi petis fari tion antaŭ la fino de la jaro.
KT ne scias ĉu iu(j) reagis kaj kontaktiĝis kun AO.

Rilate al la per tiu agado kaŭzitaj kostoj kaj ankaŭ pri ceteraj kostoj en similaj kazoj, KT demandas al kiu ŝi petu la pagon ?
Laŭ la ceteraj kunsidantoj al tiu kiu petas aŭ al kiu profitas el la aktiveco.

3. Financoj.
Nenio nova. PP esperis esti preta ĝustatempe pri la jaro 1983, sed ne sukcesis. Li jes klopodos esti preta por la venonta kunsido.

4. Gazetara Rebatservo

4.1. Al sia alvoko (vidu la slipon en la antaŭa numero de INFORMILO), JB ricevis unu respondon de G. Pirlot ! Li sin demandas ĉu eble la jarŝanĝaj festoj kulpas pri la silento aŭ eble la erara adreso en la slipo (Amerikalei anstataŭ Frankrijklei).
Decidiĝas denove enmeti la alvokilon (post korektado) en venonta(j) numero(j) de INFORMILO.
ES opinias ke la afero devas esti regule rememorigita. Li atentigas ke G. Pirlot sukcesis organizi sian gazetaran servon nur kun multe da pacienco. Tamen li finfine sukcesis ĉiun jaron pli ol triobligi la atingojn de la pasinta jaro.

4.2. HVI trovis artikolon pri la arta programo de la Antverpena Universala Kongreso en "De Standaard".
Ŝi reagos al la artikolo.

4.3. JB opinias ke en la Gazetara Servo kadru ankaŭ la kontaktoj kun la radiostacioj.
Li opinias ke necese estus ke la grupoj regule sendu siajn programojn kaj komunikojn al la lokaj radiostacioj. Por ĝeneralaj tutlandaj informoj (eks. pri la Semajno pri Internacia Amikeco) li pretas dissendi al la diversaj stacioj la necesajn informojn.

KT kiu laboras en ministerio klopodos akiri la adresojn de la ekzistantaj lokaj radiostacioj kaj havigos tiun liston al JB.

JB intencas komuniki tiun liston al la grupoj petante al ili sendi siajn novaĵojn al la stacio de sia regiono.

PP opinias ke tiu informado estas tasko de la Gazetara Servo, ĉar temas pri samspeca laboreterreno.

ES renkontos Herman Deceunink je 24 01 84 kaj priparolos tion kun li.



Antaŭ ol ion ajn decidi tiurilate li proponas atendi la rezulton de tiu renkontiĝo.

5. Jubilea Jaro - Ekzamenkomisiono.

JB ricevis de UEA la regularon pri la UEA-ekzamenoj. Li ankaŭ petis ekzempleron de la UEA-diplomo, sed ne ricevis.
Decidiĝas atente pristudi la regularon kaj pridiskuti ĝin, samkiel la starigon de la ekzamenkomisiono en la venontsabata kunsido de la Jubilea Komisiono (KLUBO 100) en Bruselo.

6. "Culturele Raad Antwerpen" - delegito.

PP, kiu en la pasinteco esis "bombardita" delegito de FEL en la Kultura Konsilantaro de la urbo Antverpeno, neniam trovis tempon por partopreni ties kunsidojn kaj ne vidas eblecon plibonigi tiun situacion estonte. Tial li demandas ĉu ne pli bone indiki iun alian.
Ĉar, unuflanke la delegito devas loĝi en Antverpeno mem kaj, aliflanke temas fakte nur pri "politiko de ĉeesto" (ni tamen neniam ricevos ian ajn subvencion de la urbo) decidiĝas nenion ŝanĝi en la sistemo kaj simple daŭrigi kiel ĝis nun.

8. Ĝenerala Jarkunsido je 24 03 1984.

JB proponas okazigi je tiu dato, antaŭtagmeze administrantaran kunsidon kaj posttagmeze la ĝeneralan jarkunsidon.

La kunvokado okazos pere de la marta numero de Esperanto Panorama por tiel, sen ekstraj kostoj, atingi la plejmulton de la membraro.

Pri la estrar-elekto li proponas ne prepari balotilojn, sed uzi la tabulon troviĝantan en la kunvenejo. Tio havas plian avantaĝon ke eventualaj kandidatoj povas ankoraŭ sin prezenti ĝis la balotado.

10. Diversaĵoj.

10.1. Laborkalendaro :

JB proponas jenan laborkalendaron por 1984.

- 14 01 1984 : estrarkunsido (jam okazis)
- 04 02 1984 : "
- 03 03 1984 : "
- 24 03 1984 : - antaŭtagmeze administrantara kunsido
  - posttagmeze ĝenerala jarkunsido
- 07 04 1984 : estrarkunsido
- 05 05 1984 : "
- 02 06 1984 : estrarkunsido (antaŭtagm.) + administrantara (posttagmeze)

- 07 07 1984 : estrarkunsido (ekstra)
- 08 09 1984 : estrarkunsido
- 06 10 1984 : "
- 03 11 1984 : " (ĉe FLEJA)
- 01 12 1984 : "

Verŝajne okazos dua ĝenerala kunsido en la kongreso en Aalst.

10.2. Kongreso - Aalst

La organizantoj proponas kiel titolon : "DUA FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO" kiel en 1931.
Konsentite.

La financa parto estas preskaŭ preta. La kotizo verŝajne estos ĉirkaŭ BF 1.500,- La aliĝoj verŝajne estos pretaj por esti kunsenditaj kun ESPERANTO PANORAMA, marta numero. Rilate al la financoj, la organizantoj proponas respondeci pri ili en la proporcio 50/50 kun FEL.

Temo. Estis ia kontraŭstaro en la organizanta grupo pri la fakto ke FEL volas altrudi temon al la kongreso. Konstatiĝas unue ke FEL tute ne prezentis temon por la kongreso sed jes pri ero el ĝi, nome por la kolokvo ; due ke FEL jes respondecas pri la temo de la kongreso, malgraŭ ĉio. Decidiĝas do nenion ŝanĝi.

10.3. ES raportas ke li ricevis leteron de Anne Tilmont en kiu ŝi anoncas ke ŝi ne plu laboras en la Esperanto Centro kaj do ankaŭ ne plu redaktas ESPERANTO PANORAMA.
La redaktadon transprenis provizore PP.

10.4. JB raportas ke li ricevis leteron de Roland Rotsaert anoncanta ke Bruĝa Esperantogrupo volas organizi Markolan Kongreson je 19-22 04 1985 kaj petanta averti lin se je tiuj datoj okazos io alia.
PP informiĝos ĉe UEA.

10.5. PP do duobligis la flavajn paĝojn en ESPERANTO PANORAMA ebligante tiel al la grupoj profiti de tio por publikigi siajn komunikojn kaj novaĵojn. Sekve al tio la Antverpena LA VERDA STELO estas preta forigi sian bultenon ESPERANTO NOVAĴOJ kaj eluzi tiun eblecon. Tial LVS pretas preni kolektivan abonon por sia membraro kaj por la iamaj-ankoraŭ-ne-repagintaj-sian-koti-zon- membroj. Tio signifas ke LVS abonus ± 450 ekstrajn numerojn.

Jen solvo ankaŭ interesa por la aliaj grupoj.

Fino : 16.30 h.

JB

-----------------



1 9 8 4 - Plia paŝo al la 100-jariĝo de ESPERANTO.

Multo estas okazonta, -enda, ankaŭ en propraj rangoj.

Krom la speciala jubilea programo, al kiu ĉiu devus partopreni, ĉiu laŭ siaj kapablo kaj povo, al ni en F E L atendas gravaj decidoj.

Post kvinjara funkciado, ni devos, eĉ se kontraŭvole, adiaŭi, almenaŭ por minimume unu jaro, nian prezidanton Edward Symoens kaj anstataŭi lin. Tio okazu en la ĝenerala jarkunsido de 24-a de marto.

Je tiu sama dato ankaŭ estos decidite pri la plia funkciado de la estraro kaj la komisonoj.

Cetere, antaŭ ol forgesi, ĉiu kunlaboranto kaj aŭ komisionestro (-ano) (vidu p. 2 de ĉi bulteno) estas petata prepari sian raporton pri sia dum 1983-a laborado por tiu ĝenerala jarkunsido. Pasintjare diversaj el inter ili forgesis tion. Ni esperas pli bonan kunlaboron ĉijare.

Komprenenble, por la estraro k.s. bonvenaj estas pliaj kandidatoj.

Plia kunlaboro estas necesa rilate al la preparo de la planita kolokvo okaze de nia kongreso en Aalst. (vidu ankaŭ la antaŭan numeron de INFORMILO). Ĝian temon vi jam konas :

KIEL ELIRI EL LA STAGNADO NUNTEMPA ?
KIUJ ESTAS LA PSIKOLOGIAJ MOTIVOJ KONVINKAJ ?

Viaj tekstoj estas atendataj de la sekretario, p/a ESPERANTO CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN.

Rilate al la jubilea jaro stariĝis, kiel jam anoncite,

K L U B O 1 0 0

Pere de unufoja kontribuo de BF 1.000,-, pagota en la konton
034-0379435-33
vi povas membriĝi, partopreni la kunsidojn, fari sugestojn, voĉdoni, unuvorte k u n d e c i d i.

Kelkaj jam pagis, jen la unua listo kompletigota laŭvice.

1. Roland ROTSAERT
2. Jules VERSTRAETEN
3. jan BOVENDEERD
4. Marc DEMONTY
5. André MERTENS-GOOSSENS

Fakte la intenco estas trovi almenaŭ 100 personojn por akiri tiel duoblan signifon de la nombro 100 : nome cent personoj por la centjariĝo de

ESPERANTO.

Cetere, kiel vi jam povis legi en ESPERANTO EN BELGIO (aldono de la revuo ESPERANTO), membriĝo al KLUBO 100 ankaŭ signifas partopreni en lotumado por eksterlanda vojaĝo, oferita de MONDA TURISMO.

Multo pli troviĝas en nia planaro. Pri ĝia realigo respondecos la nov-elektota estraro, kiu kompreneble povos ĝin adapti, kompletigi ktp. Zorgu ke vi ĉeestu la ĝeneralan jarkunsidon por kundecidi pri tiu nova estraro kaj la onta agado de la Ligo.

Por fini provizore, ni volus ripeti niajn sincerajn kaj amikecajn dezirojn pri

s a n o

p r o s p e r o

p a c o

a m i k e c o

s u k c e s o

kaj ĉio kio estas necesa por esti tute feliĉaj en la venontaj jaroj.

---

Kiel vi scias, la Semajno pri Internacia Amikeco okazos ĉiujare en la lasta plena semajno de februaro.

Ĝis nun ni scias pri festaj programoj en Leuven (19 12 1984) kaj en Antverpeno (24 02 1984).

Bedaŭrinde la tradicia festado en Kalmthout ĉi jare ne okazos.

Grupoj kiuj planas ion specialan okaze de tiu semajno, bonvolu anonci al la skekretario. Ni nome planas ĝeneralan publikigadon de tiuj aktivecoj kiel eble plej grandskalan.

Pro via afabla kunlaboro ni antaŭdankas.

---

Gratulojn.

Al Willy kaj Mireille SMET-STORMS naskiĝis bebo, nomita Gebbe.
Al la gepatroj ni elkore gratulas, al Gebbe ni deziras ĉion plej bonan kaj feliĉan vivon.

---